

FB2: , 04.08.2008, version 1.0

UUID: 4E6447FF-B85D-422A-9901-B1DB50660FAF

PDF: fb2pdf-j.20180924, 29.02.2024

Александр Пушкин

La negha blovado

Содержание

La negha blovado Novelo de Aleksandr Pusxkin # La negxa blovado (Traduko de Antoni Grabowski) # Komentario (Aleksander Korjxenkov) # Notoj (Aleksander Korjxenkov)	0003
Komentario, Sezonoj, 1993 Elektronika eldono, La Ondo de Esperanto, 1998 LA NEGxA BLOVADO	0004
Ha, nenio!	0015
Kaj en la aeron ili jxetadis la cxapetojn.	0020
Mario Gavrilovna elrigardis lin kun mirigxo. . .	0025
Burmin ekpaligxis... kaj jxetis sin al sxiaj piedoj...	0029
NOTOJ	0032
Se amor non? che dunque,? quel chi sento? . . .	0036

La negha blovado

Novelo de Aleksandr Pusxkin

La negxa blovado (Traduko de Antoni Grabowski)

Komentario (Aleksander Korjxenkov)

Notoj (Aleksander Korjxenkov)

La titolo de la rusa originalo: Tradukis el la rusa Antoni Grabowski en 1888 Kompostis, enpagxigis kaj komentis: Aleksander Korjxenkov Kontrolis: Halina Gorecka

Pusxkin, Aleksandr Sergejevicx. La negxa blovado: Novelo / Tradukis el la rusa Antoni Grabowski; Komentis Aleksander Korjxenkov. - Jekaterinburg: Sezonoj, 1993. - 16 p. - (Literatura suplemento al La Ondo de Esperanto).

Komentario, Sezonoj, 1993

Elektronika eldono, La Ondo de
Esperanto, 1998

LA NEGxA BLOVADO

En la fino de l' jaro 1811a, en epoko al ni
memorinda, vivis en sia vilagxo Nenaradovo
la bona Gavriilo Gavrilovicx R. Li glorigxis en la
tuta cxirkauxajxo pro gastamo kaj koreco; la
najbaroj cxiuminute veturadis al li por mangxi,
trinki, ludi kun lia edzino Praskovja Petrovna po
kvin kopekoj je l' bostono; kaj kelkaj el ili - por
rigardi ilian filineton Marion Gavrilovna'n,
gracian, palan kaj deksepjaran junulinon. Sxi
estis rigardata kiel ricxa frauxlino, kaj multaj
antauxdecidis sxin por si aux por siaj filoj.

Mario Gavrilovna estis edukita sur francaj
romanoj kaj tial kompreneble jam amanta. La
objekto, elektita de sxi, estis malricxa oficiro, kiu
sin trovis forpermese en sia vilagxeto. Estas

kompreneble per si mem, ke la juna homo brulis egale per ama fajro, kaj ke la gepatroj de lia amata, sciigxinte ilian duflankan amon, malpermesis la filinon ecx pensi pri li, kaj lin ricevadis pli malbone ol eksigitan juran alsidanton.

Niaj amantoj estis en korespondado, kaj cxiun tagon ili sin vidis je kvar okuloj en pina arbareto aux cxe l' malnova peregxejeto. Tie ili jxuradis unu al la alia eternan amon, plendadis je la sorto kaj faradis multoblajn projektojn. Korespondante kaj interparolante tiusence, ili (kio estas tre natura) alvenis al la jena decido: se ni unu sen la alia ne povas vivi, kaj la volo de la senkompataj gepatroj baras nian felicxon, cxu ni ne povas veni al la celo ankaux sen gxi? Oni komprenas, ke tiu cxi felicxa penso venis unue en la kapon de l' juna homo, kaj ke gxi multe placxis al la romana fantazio de Mario Gavrilovna.

Venis la vintro kaj cxesigis iliajn revidojn, sed la korespondado farigxis tiom pli viva. Vladimiro Nikolajevicx en cxiu letero sxin petegis ke sxi transdonu sin al li, edzigxu je li sekrete, kasxu sin

kelkan tempon kun li, kaj poste ili jxetus sin al la piedoj de la gepatroj, kiuj nature estus fine tusxitaj per la heroa konstanteco kaj la malfelicxo de la amantoj kaj dirus al ili certe: "infanoj, venu al niaj koroj!"

Mario Gavrilovna longe sxanceligxadis; multaj projektoj de l' forkuro estis forjxetitaj. Fine sxi konsentis: en certigita tago sxi devis ne vespermangxi, sed forigxi en sian cxambron el la sxajnkauxzo de l' doloro je l' kapo. Sxia servanta knabino estis en la komploto; ili du devis eliri en la gxardenon trans la posta balkona sxtuparo, trovi pretigitan glitveturilon, sidigi sin en gxi kaj veturi cxirkaux kvin verstojn de Nenaradovo, en la vilagxon Jxadrino, rekte antaux la pregxejon, kie Vladimiro jam devis ilin atendi.

Antaux la decidanta tago Mario Gavrilovna ne dormis tutan la nokton; sxi ordadis kaj kunligadis sian tolajxon kaj vestajxon, skribis longan leteron al unu sentema frauxlino, sia amikino, alian al siaj gepatroj. Sxi diris adiaux al ili en la plej kortusxantaj vortoj, senkulpigis sian eraron per la nevenkebla forto de la ama sento

kaj finis per tio, ke la plej felicxa minuto de l' vivo estos por sxi tiu, kiam estos permesita al sxi jxeti sin al la piedoj de la plej karaj gepatroj. Sigelinte la du leterojn per Tula sigelilo, sur kiu estis elformitaj du brulantaj koroj kun konvena surskribo, sxi jxetis sin sur la liton mallonge antaux la lumigxado de l' tago, kaj ekdormetis; sed ankaux tie cxi teruraj songxaj fantazioj cxiuminute sxin vekadis. Jen eksxajnis al sxi, ke en tiu sama minuto, kiam sxi sidigxis en la glitveturilon por veturi al la edzigxo, la patro sxin ekhaltigis, kun turmenta rapideco sxin trenis sur la negxo kaj jxetis en malluman kaj senfundan subterajxon... kaj sxi flugis malsupren kun neklarigebla mortigxado de l' koro... jen sxi vidis Vladimiron, kusxantan sur la herbo, palan kaj sangantan. Mortante, li petegis sxin per vocxo iranta tra l' koro, ke sxi rapidu por lin edzigi.. Aliaj malbelaj, sensencaj songxaj vidajxoj sin portis antaux sxi unu post alia. Fine sxi levis sin el la lito, pli pala ol kutime, kaj kun ne-preteksta doloro je l' kapo. La patro kaj la patrino ekvidis sxian maltrankvilecon; ilia karesa zorgado kaj la sencxesaj demandoj: kio estas al vi, Manjo? Cxu vi ne estas malsana, Manjo? - disxiradis al sxi la

koron. Sxi penis ilin trankviligi, montri sin gxoja, kaj ne povis. Venis la vespero. La penso, ke jam je l' lasta fojo sxi pasigas tagon en la mezo de sia familio, premis sxian koron. Sxi estis apenaux viva; sekrete sxi diris adiaux al cxiuj personoj, al cxiuj objektoj, kiuj sxin cxirkauxadis. La vespermangxo estis enportita; sxia koro forte ekfrapis. Per tremanta vocxo sxi diris, ke sxi ne havas apetiton por vespermangxi kaj komencis adiauxi je la patro kaj la patrino. Ili sxin kisis kaj, kiel kutime benis; sxi apenaux ne ekploris. Veninte en sian cxambreton, sxi jxetis sin sur la segxon kaj versxis varmegajn larmojn. Sxia knabino konsilis al sxi, ke sxi trankviligxu kaj kuragxigxu. Cxio estis preta. Post horduono Manjo devis por cxiam forlasi la domon gepatran, sian cxambron, la trankvilan vivon frauxlinan. Ekstere estis negxa blovado; la vento fajfis, la lignaj fenestraj kovriloj tremadis kaj frapadis; cxio sxajnis al sxi kiel timigadoj kaj malfelicxaj antauxsignoj. Baldaux en la domo cxio trankviligxis kaj ekdormis. Manjo cxirkauxkovris sin per sxalo, metis sur sin varman superveston, prenis en la manon sian kesteton kaj eliris sur la postan verandon. La servantino portis post sxi du

kuneligajxojn. Ili eliris en la gxardenon. La negxa blovado ne trankviligxis, la vento blovis kontrauxen, kiel penante haltigi la junan krimulinon. Fine ili alvenis al la fino de l' gxardeno. Sur la vojo glitveturilo ilin atendis. La cxevaloj, trafrostitaj, ne volis stari trankvile sur la loko, la veturigisto de Vladimiro promenadis antaux la glitveturila turnilo moderigante ilian fajrecon. Li helpis la sinjorinon kaj sxian servistinon sidigxi kaj kusxigi la kuneligajxojn kaj la kesteton, prenis la kondukilojn en la manojn kaj la cxevaloj fluge ekkuris. Transdonante la frauxlinon al la zorgado de l' sorto kaj al la arto de Teresxka, la veturigisto, ni turnigxos al nia juna amanto.

La tutan tagon Vladimiro estis en veturado. Matene li estis cxe l' Jxadrina pastro; kun malfacilo ili venis al konsento. Poste li veturis sercxu atestantojn por la edzigxo inter la najbaraj vilagxestroj. La unua, al kiu li venis, la eksa kvardekjara standardestro Dravin, konsentis kun plezuro. Tiu cxi afero, li diris, rememorigis al li la pasintajn tempojn kaj la husarajn sxercetojn. Li invitis Vladimiron resti cxe li por tagmangxi kaj certigis lin, ke trovi la du aliajn atestantojn, ne

estos malfacile. Efektive tuj post la tagmangxo venis la geometriisto Sxmidt kun lipharoj kaj pikradetoj cxe la botoj, kaj la filo de kapitano de l' jxandarmaro, knabeto deksexjara, kiu antaux kelka tempo aligxis al la ulanoj. Ili ne sole alprenis la proponon de Vladimiro, sed ankaux jxuris la pretecon oferi al li la vivon. Vladimiro cxirkauxprenis ilin kun neesprimebla gxoyo kaj forveturis la domon por sin prepari.

Jam longe mallumigxadis. Li elsendis sian fidelan Teresxka'n en Nenaradovon kun sia trio da cxevaloj kaj kun detala, vasta ordono; por si li ordonis prepari malgrandan glitveturilon unucxevalan, kaj tute sola, sen veturigisto, li forveturis Jxadrinon, kien post du horoj devis ankaux alveni Mario Gavrilovna. La vojon li konis, kaj la tuta veturo devis dauxri nur dudek minutojn.

Sed apenaux Vladimiro estis elveturinta en la kampon, eklevis sin vento kaj farigxis tia negxa blovado, ke li nenion vidis. En unu minuto la vojo estis kovrita de negxo, la cxirkauxajxo perdigxis en la nebulo malklara kaj flaveta, tra kiu flugadis

blankaj flokoj de l' negxo; la cxielo kunigxis kun la tero; Vladimiro ekvidis sin sur la kampo kaj vane li volis denove eltrovi la vojon; la cxevalo pasxis rekte antauxen kaj cxiuminute jen gxi veturadis sur negxan amason, jen faladis en kavon; la glitveturilo cxiuminute sin renversadis. Vladimiro nur penis ne perdi la veran direkton. Sed sxajnis al li, ke jam pasis pli ol duonhoro kaj li ankoraux ne alveturis al la Jxadrina arbetaro. Pasis ankoraux cxirkaux dek minutoj, la arbetaro cxiam ankoraux ne estis videbla. Vladimiro estis veturanta tra kampo tranxita per profundaj kavoj. La negxa blovado ne trankviligxadis, la cxielo ne ellumigxadis. La cxevalo komencis lacigxi kaj de li la sxvito faladis kiel hajleroj, malgraux ke li cxiuminute estis gxis la duono en la negxo.

Fine li ekvidis, ke li veturis en malvera direkto. Vladimiro haltis; li komencis pripensadi, prezentadi al si kaj certigxis, ke li devis preni la vojon dekstren. Li ekveturis dekstren. Lia cxevalo apenaux pasxadis. Jam pli ol unu horon li estis en vojo. Jxadrino devis esti proksima. Sed li veturis, veturis, kaj la kampo ne havis finon. Cxie negxaj

amasoj kaj kavoj; cxiuminute la glitveturilo sin renversadis, cxiuminute li gxin levadis. La tempo pasadis, Vladimiro komencis forte maltrankviligxi. Fine en flanko sin montris io nigra. Vladimiro tien sin turnis. Proksimigxante li ekvidis arbetaron. Glor' al Dio, li ekpensis, nun gxi estas proksima. Li veturis al la arbetaro, esperante baldaux trovi la konatan vojon aux cxirkauxveturi la arbetaron: Jxadrino estis tuj post gxi. Baldaux li trovis la vojon kaj enveturis en la mallumon de l' arboj, nudigitaj de la vintro. La vento ne povis tie koleregi; la vojo estis glata; la cxevalo reprenis la kuragxon kaj Vladimiro trankviligxis.

Sed li veturis kaj Jxadrino ne estis videbla; la arbetaro ne havis finon. Vladimiro kun teruro ekvidis, ke li estis enveturinta en nekonatan arbaron. Malespero lin prenis. Li ekbatis la cxevalon; la bedausrinda besto ekiris kure, sed baldaux gxi komencis iri pasxe, malgraux cxuiuj penoj de la malfelicxa Vladimiro.

Baldaux la arboj komencis maldensigxi kaj Vladimiro elveturis el la arbaro. Jxadrino ne estis

videbla. Estis cxirkaux la noktomezo. La larmoj ekfluis el liaj okuloj; nun li veturis rekte antauxen. La vetero trankviligxis; la nuboj disiradis; antaux li kusxis ebenajxo, kovrita de blanka ondforma tapisxo. La nokto estis suficxe luma. Li ekvidis nemalproksime vilagxeton, kunmetitan el kvar aux kvin kortoj. Vladimiro veturis tien. Cxe l' unua dometo li elsaltis el la glitveturilo, alkuris al la fenestro kaj komencis frapadi. Post kelkaj minutoj la ligna fenestra kovrilo sin levis kaj ia maljunulo elmetis sian grizan barbon. "Kion vi bezonas?" - "Jxadrino estas malproksima?" - "Cxu Jxadrino estas malproksima?" - Jes, jes! Cxu gxi estas malproksima?" - "Proksimeta, estos cxirkaux deko da verstoj". Cxe tiu cxi respondo Vladimiro ekkaptis la kapon kaj restis senmova kiel homo, jugxita al la morto.

"El kie vi estas?" - dauxrigis la maljunulo. Vladimiro ne havis la kuragxon respondi je demandoj. "Cxu vi povas, maljunulo, - li diris, - preni por mi cxevalojn gxis Jxadrino?" - "Ni ne havas cxevalojn", - respondis la vilagxano. "Cxu mi ne povas ricevi almenaux kondukanton? Mi

pagos kiom al li placxos". - "Atendu", diris la maljunulo, fermante la fenestran kovrilon, - mi elsendos al vi la filon; li vin kondukos". Vladimiro atendis, sed apenaux pasis unu minuto, li ree komencis frapi. La fenestra kovrilo sin levis, la barbulo sin montris. "Kion vi bezonas?" - "Kie estas via filo?" - "Li tuj eliros, li prenas la botojn. Sed vi malvarmigxis? Eniru varmigxi". - "Mi dankas, elsendu pli rapide la filon".

La pordego akre eksonis, la knabego eliris kun bastonego kaj iris antauxen, jen montrante, jen elsercxante la vojon, kovritan de negxaj amasoj. "Kioma horo?" - demandis lin Vladimiro. "Jam baldaux lumigxos", - diris la juna vilagxano. Vladimiro ne parolis jam pli ecx unu vorton.

La kokoj kantis kaj estis jam luma tago, kiam ili alvenis Jxadrinon. La pregxejo estis fermita. Vladimiro pagis la kondukanton kaj enveturis en la korton, al la pastro. Lia trio da cxevaloj jam tie ne estis. Kia sciigo lin atendis!

Sed ni returnigxos al la bonaj Nenaradovaj vilagxestroj kaj ni rigardos, kio cxe ili farigxas.

Ha, nenio!

La maljunuloj vekigxis kaj eniris en la gastcxambron. Gavriilo Gavrilovicx en nokta cxapo kaj mallonga varma surtuto, Praskovja Petrovna en vata noktsurtuto. Oni alportis la temasxinon kaj Gavriilo Gavrilovicx sendis la knabinon por sciigxi de Mario Gavrilovna, kia estas sxia sano kaj kiel sxi elripozis. La knabino revenis, sciigante, ke la frauxlino ripozis malbone, sed ke nun sxi fartas pli bone kaj ke sxi tuj venos en la gastcxambron. Efektive, la pordo sin malfermis kaj Mario Gavrilovna eniris por saluti la patreton kaj la patrineton.

"Kion faras via kapo, Manjo?" - demandis Gavriilo Gavrilovicx'. "Pli bone, patreto", - respondis Manjo. "Vi kredeble, Manjo, ricevis hieraux kapdoloron de forna haladzo", - diris Praskovja Petrovna. "Povas esti, patrineto", - respondis Manjo.

La tago pasis felicxe, sed en la nokto Manjo malsanigxis. Oni sendis en la urbon al la kuracisto. Li alvenis vespere kaj trovis la

malsanan en deliro. Aligxis forta febro, kaj la bedauxrinda malsanulino du semajnojn sin trovadis sur la bordo de l' tombo.

Neniu en la domo sciis ion pri la intencita forkuro. La leteroj skribitaj de sxi estis jam bruligitaj; sxia servantino nenion al iu parolis, timante la koleron de la gesinjoroj. La pastro, la eksa standardestro, la liphara geometriisto kaj la aminda ulano estis diskretaj, kaj nesenkauxze. Teresxka la veturigisto neniam ion senbezonan eldiris ecx en malsobra estado. Tial la sekreto estis kasxata de pli ol duona dekduo da kunsiantoj. Sed Mario Gavrilovna mem, en sencxesa deliro, elrakontis sian sekreton. Tamen sxiaj vortoj estis tiel mirindaj kaj neligeblaj kun io, ke la patrino - ne foriranta de sxia lito - povis kompreni el ili nur tion, ke sxia filino estis morte amanta Vladimiron Nikolajevicxon, kaj ke kredeble la amo estis la kauxzo de sxia malsano. Sxi konsiligxis kun sia edzo, kun kelkaj najbaroj, kaj fine unuvocxe cxiuj decidis, ke videble tia estis la sorto de Mario Gavrilovna, ke la difiniton de l' sorto ni per cxevalo ne forkuros, ke la malricxeco ne estas krimo, ke oni ne vivas kun

ricxeco, sed kun la homo kaj cetero. Similaj popoldiroj estas mirinde utilaj en tiuj cxi okazoj, kiam ni mem nur tre malmultan povas elpensi por nia pravigo.

Dume la frauxlino komencis sanigxi. Vladimiro jam longe ne montris sin en la domo de Gavriilo Gavrilovicx. Li estis ja senkuragxigita per la kutima ricevo. Oni decidis sendi al li kaj sciigi lin pri la neesperita felicxo, la permeso je l' edzigxo. Sed kia estis la mirigxo de la Nenaradovaj vilagxestroj, kiam kiel respondon al ilia invito ili ricevis de li duone malprudentan leteron! Li sciigis ilin, ke lia piedo neniam estos en ilia domo, kaj li petis, ke ili forgesu la malfelicxulon, por kiu la morto restas la sola espero. Post kelkaj tagoj ili sciigxis, ke Vladimiro forveturis en la militistaron. Tio cxi estas en la 1812 j.

Longe ili ne havis kuragxon paroli pri tio al la sanigxanta Mario. Sxi neniam rememorigis Vladimiron. Kelkajn monatojn jam poste, trovinte lian nomon en la nombro de la honore distingigxintaj kaj grave vunditaj cxe Borodino,

sxi falis sensente kaj oni timis, ke sxia febro ne revenu. Sed tamen, glor' al Dio, la sensento ne havis postsignojn.

Dua cxagreno sxin renkontis. Gavriilo Gavrilovicx mortis, restigante sxin heredantino de la tuta havo. Sed la heredo sxin ne konsolis; sxi kore dividis la malgxojon de la malfelicxa Praskovja Petrovna kaj jxuris neniam apartigxi de sxi; ili du forlasis Nenaradovon, la lokon de la malgxojoj rememoroj, kaj forveturis por vivi en vilagxo.

Frauxloj cxirkauxadis ankaux tie cxi la amindan kaj ricxan frauxlinon, sed sxi donis al neniujn ecx la plej malgrandan esperon. La patrino iam konsilis al sxi ke sxi elektu edzon! Mario Gavrilovna balancadis la kapon kaj farigxis pensema. Vladimiro jam ne vivis: li mortis en Moskvo, tagon antaux la eniro de la Francoj. Lia memoro sxajnis sankta por Manjo; almenaux sxi konservis cxion, kio lin povis rememorigi: la librojn, de li iam legitajn, liajn pentrojn, notojn kaj versojn, kiujn li por sxi transskribis. La najbaroj, sciigxinte pri cxio, miris sxian

konstantecon kaj kun sciemo atendis la heroon venkontan fine la fidelecon de tiu cxi frauxlino Artemizo.

Dume la milito estis finita kun gloro. Nia regimentoj revenadis el la alilando. La popolo iris al ili kontrauxen. La muziko ludis muzikajn kantojn: "Vive Henri Quatre", tirolajn valsojn kaj ariojn el "Jxokondo". La oficiroj, kiuj eliris en la militon preskaux infanoj, revenis, virigxintaj de milita aero kaj cxirkauxpenditaj per krucoj. La soldatoj gxoje paroladis inter si, enmiksante cxiuminute en la lingvon germanajn kaj francajn vortojn. Tempo ne forgesbla! Tempo de l' gloro kaj de l' gxoyo! Kiel forte frapis la rusa koro cxe l' vorto "patrujo"! Kiel dolcxaj estis la larmoj de l' revido! Kun kia unuanimeco ni unuigis la sentojn de la popola fiereco kaj de l' amo je l' regnestro! Kaj por li, kia estis tiu cxi minuto!

La virinoj, la rusaj virinoj, estis tiam sensimilaj. Ilia kutima malvarmecoj perdigxis. Ilia gxoyo estis efektive malsobriganta, kiam renkontinte la venkintojn ili kriadis: hura!

Kaj en la aeron ili jxetadis la cxapetojn.

Kiu el la tiamaj oficiroj ne konfesos, ke al la Kirusa virino li sxuldis la plej bonan kaj la plej multekostan rekompenco?..

En tiu cxi brilanta tempo Mario Gavrilovna vivis kun la patrino en la gubernio, kaj ne vidis kiel la du cxefurboj festis la revenon de la soldataroj. Sed en la rondurboj kaj la vilagxo la komuna gxoj estis eble ankoraux pli forta. La ricevo de oficiro en tiuj cxi lokoj estis por li efektiva triumfo kaj al la amanto en frako estis ne plezure en lia najbareco.

Ni jam diris, ke malgraux sia malvarmeco Mario Gavrilovna kiel antauxe estis cxirkauxata de frauxloj. Sed cxiuuj devis forigxi kiam ekmontris sin en sxia palaco la vundita husara regimentestro Burmin, kun la Georgio en la buton-trueto kaj "kun interesanta paleco" kiel paroladis la tiamaj sinjoridinoj. Li havis cxirkaux dudek ses jarojn. Li alveturis forpermeso en siajn

vilagxojn, kiuj sin trovis en la najbarajxo de la vilagxo de Mario Gavrilovna.

Mario Gavrilovna lin distingis. Apud li sxia kutima pensemeco vivigxadis. Oni ne povus diri, ke sxi lin koketis; sed la poeto, vidinte sxian tenigxon, certe dirus: "Se amor non?, che dunque?"...

Burmin estis efektive multe aminda juna homo. Li havis tiun cxi talenton, kiu placxas al la virinoj: la talenton de gxentila senpena rigardemo kaj de modesta sprito. Lia renkontado kun Mario Gavrilovna estis rekta kaj libera; sed kion ajn sxi dirus aux farus, lia animo kaj liaj rigardoj cxiam sxin akompanadis. Li sxajnis de karaktero trankvila kaj modesta, sed la famo rakontis, ke antauxe li estis terura sovagxulo, kaj tio cxi ne malutilis al li en la opinio de Mario Gavrilovna, kiu (kiel ankaux cxij junaj sinjorinoj senescepte) kun plezuro senkulpigis la malprudentajxojn montrantajn kuragxon kaj fajrecon de l' karaktero.

Sed pli ol cxio... (pli ol lia karemo, pli ol la

interesanta paleco, pli ol la bandagxita mano) la silentado de la juna husaro vekadis sxian sciemon kaj fantazion. Sxi ne povis ne konscii tion, ke sxi multe al li placxis; kredeble ankaux li kun sia sprito kaj koneco de la homoj povis jam ekvidi, ke sxi lin elektis: kial gxis nun sxi ne vidis lin apud siaj piedoj kaj ne auxdis lian konfeson? Kio lin retenadis? Ia, timemo, neapartigebla de l' efektiva amo, la fiereco aux la koketado de lerta amisto? Tio cxi estis por sxi enigmo. Pensinte bone, sxi decidis, ke la timemo estis sole la kauxzo, kaj intencis kuragxigi lin per pli granda atenteco kaj, laux la okazoj, ankaux per karesado. Sxi preparadis la plej neesperatan disligon kaj malatendeme atendis la minuton de la romana klarigxo. La sekreto, kia ajn gxi estus, cxiam premas la virinan koron. Sxijaj militaj operacioj havis la deziratan finon: almenaux Burmin farigxis tiel pensema kaj liaj nigraj okuloj kun tia fajro haltadis sur Mario Gavrilovna, ke la decidanta minuto sxajnis jam proksima. La najbaroj paroladis pri la edzigxo kiel pri fakto jam finita, kaj la bona Praskovja Petrovna gxojadis, ke sxia filino fine trovis por si indan fiancxon.

La maljunulino sidis unu fojon sola en la gastcxambro, diskusxigante kartojn (la grande patience), kiam Burmin eniris en la cxambrom kaj tuj demandis pri Mario Gavrilovna. "Sxi estas en la gxardeno", - respondis la maljunulino; - "iru al sxi, kaj mi vin tie cxi atendos". Burmin foriris kaj la maljunulino faris la signon de l' kruco kaj ekpensis: nun eble la afero hodiaux finigxos!

Burmin trovis Marion Gavrilovna'n apud la lageto, kun libro en la manoj en blanka vesto, kiel efektiva heroino de l' romano. Post la unuaj demandoj Mario Gavrilovna intence cxesis subteni la interparolon, fortigante tiel la duflankan senkonsilecon, de kiu oni povis liberigxi nur per subita kaj decida klarigo. Tiel ankaux farigxis. Burmin, sentante la malfacilecon de sia pozicio diris, ke li sercxis jam longe la okazon por malkovri al sxi sian koron, kaj postulis minuton da atento. Mario Gavrilovna fermis la libron kaj mallevis la okulojn por signo de l' konsento.

"Mi vin amas, - diris Burmin, - mi vin amas

pasie..." (Mario Gavrilovna rugxigxis kaj mallevis la kapon ankoraux pli multe). "Mi faris sengardeme, donante min al la aminda kutimo, al la kutimo vidi kaj auxdi vin cxiutage..." (Mario Gavrilovna rememoris la unuan leteron de St. Preux.) "Nun estas jam tro malfrue batali kun mia sorto; la rememoro je vi, via aminda sensimila imago, de nun estos la turmento kaj la konsolo de mia vivo; sed al mi ankoraux restas plenumi la malfacilan devon, malkovri al vi la teruran sekreton kaj meti inter ni netrapaseblan barilon..." - "Gxi cxiam ekzistis, - interrompis kun viveco Mario Gavrilovna, - mi neniam povis esti via edzino..." - "Mi scias, - respondis li trankvile, - mi scias ke iam vi amis, sed la morto kaj tri jaroj da plorado... Bona, kara Mario Gavrilovna! ne penu forpreni de mi la lastan konsolon: la penson, ke vi konsentus fari mian felicxon, se... Silentu, pro Dio, silentu; vi min turmentas. Jes, mi scias, mi sentas, ke vi estus mia, sed... mi plej malfelicxa kreitajxo... mi estas edzigita!"

Mario Gavrilovna elrigardis lin kun mirigxo.

"**M**i estas edzigita, - dauxrigis Burmin; - mi estas edzigita jam la kvaran jaron, kaj mi ne scias, kiu estas mia edzino, kaj kie ŝi estas, kaj cxu mi devas ŝxin iam revidi!"

"Kion vi parolas? - ekkriis Mario Gavrilovna; - kiel gxi estas mirinda! Dauxrigu! mi rakontos poste... sed dauxrigu, estu tiel bona!"

"Je la komenco de l' 1812a jaro, - diris Burmin, - mi rapidis Vilnon, kie trovigxis nia regimento. Alveninte unu fojon sur ian posxtan stacion malfrue en la vespero, mi ordonis kiel eble plej rapide almeti la cxevalojn kiam subite levis sin terura negxa blovado; la posxta inspektoro kiel ankaux la postilionoj konsilis al mi, ke mi atendu. Mi ilin obeis; sed ia nekomprenbla maltrankvilo min ekregxis; ŝxajnis, ke iu min puxxadis. Dume la negxa blovado ne trankviligxadis; mi ne povis min teni, mi ordonis ree almeti la cxevalojn kaj forveturis,

malgraux la ventego. Al la postiliono sxajnis pli bone veturi trans la rivero, kio devis plimallongigi nian vojon per tri verstoj. La bordoj estis kovritaj de negxo, la postiliono transveturis flanke de la loko, kie ni devis elveturi sur la vojon, kaj tial ni nin ektrovis en nekonata loko. La blovego ne cxesadis; mi ekvidis lumeton kaj ordonis veturi tien. Ni alveturis en vilagxon; en la ligna pregxejo estis lumo. La pregxejo estis malfermita; post la barilo staris kelkaj glitveturiloj, en la vestiblo iradis homoj. "Tien cxi! Tien cxi!" - ekkriis kelkaj vocxo. Mi igis la postilionon antauxveturi. "Sed permesu, kie vi estis tiel longe? - diris al mi iu, - la fiancxino sin trovas en sensenta estado; la pastro ne scias, kion fari; ni jam estis pretaj veturi reen. Eliru pli rapide!" Silentante mi elsaltis el la glitveturilo kaj eniris en la pregxejon, malforte lumigatan per du aux tri kandeloj. Knabino sidis sur benko en malluma angulo de la pregxejo; alia frotis sxiajn tempiojn. "Glor' al Dio, - sxi diris: - fine vi alveturis! Vi preskaux mortigis la frauxlinon!" Maljuna pastro proksimigxis al mi kun la demando: "Cxu vi ordonas komenci?" - "Komencu, komencu, patreto", mi respondis

senpense. Oni levis la knabinon. Sxi al mi sxajnis ne malbela... Nekomparebla, nepardonebla knabeco... mi staris apud sxi sur la altaro; la pastro rapidis; tri viroj kaj la servantino subtenadis la fiancxinon kaj estis okupataj nur per sxi. Oni nin edzigis. "Kisu vin", - oni diris. Mia edzino turnis al mi sian palan vizagxeton. Mi volis sxin kisi... Sxi ekkriis: "Ho ne estas li!" - kaj falis sen sentoj. La atestantoj direktis sur min la terurigitajn okulojn. Mi turnigxis, eliris el la pregxejo sen ia malhelpo, jxetis min en la glitveturilon kaj ekkriis: "For! Antauxen!"

"Dio mia! - ekkriis Mario Gavrilovna, - kaj vi ne scias kio farigxis kun via bedauxrinda edzino?"

"Mi ne scias, - respondis Burmin, - mi ne scias, kiel oni nomas la vilagxon, kie mi edzigxis; mi ne memoras, el kia stacio mi veturis. En tiu cxi tempo mi tiel malmulte scietis la gravecon en mia krima sxerco, ke, forveturinte de la pregxejo mi ekdormis, kaj revekigxis la duan tagon frue, jam sur la tria stacio. La servanto, kiu estis tiam kun mi, mortis en la milito, tiel ke mi ne havas ecx la

esperon trovi tiun cxi, kun kiu mi sxercis tiel terure, kaj kiu estas nun tiel terure vengxita".

"Dio mia, Dio mia! - diris Mario Gavrilovna, kaptinte lian manon: - Tio estis vi? kaj vi min ne rekonas?"

Burmin ekpalingxis... kaj jxetis sin al sxiaj piedoj...

Tradukis el la rusa Antoni Grabowski PushkinKOMENTARIO "La plej granda rusa poeto" - tiun honoran epiteton oni kutime atribuas al Aleksandr Pusxkin (1799-1837). Kaj tio estas vera.

Tamen Pusxkin elstaras ne nur poezie, sed ankaux proze. La damo de piko, Dubrovskij, Kapitana filino kaj aliaj prozajxoj de Pusxkin grave influis al la verkoj (precipe fruaj) de Nikolaj Gogolj kaj Fjodor Dostojevskij.

La novelista talento de Pusxkin riveligxis ankaux dum la "Auxtuno de Boldino" - auxtuno de 1930, kiun pro kvaranteno li devis pasigi en Boldino (Nijxnij-Novgoroda gubernio). La tri boldinaj monatoj ofte estas konsiderataj kiel kulmino de lia kreado. Dum tiu cxi jar-kvarono elplumigxis tuta biblioteko de pusxkinaj verkoj: lastaj cxapitroj de Euxgeno Onegin, kvar Malgrandaj tragedioj (Avara Kavaliro, Mozart

kaj Salieri, Festeno dum pesto, Don Johano), kvardekstrofa Domet' en Kolomna, Fabelo pri popo kaj ties servanto Baldo, satira Historio de vilagxo Malfelicxuhxino, pluraj poemoj, recenzoj kaj kvinpeca ciklo Noveloj de forpasinta Ivan Petrovicx Belkin.

Gxuste al Noveloj de Belkin apartenas La negxa blovado. Sukcesa kombino de la romantika formo, ironia prezento-maniero kaj tradicie felicxa fino faris gxin klasikajxo de la rusa literaturo kaj inspir-fonto por multaj aliaj, ankaux por Georgij Sviridov, kiu restas en la popola memoro ne kiel komponinto de Odo al Lenin, sed kiel auxtoro de la mirinda muziko al la kinofilmo La negxa blovado. Ni citu ankaux la vortojn de Lev Tolstoj, kiu skribis en 1873 al P.Golohxvatov:

"...tralegu dekomence cxiujn Novelojn de Belkin. Ilin devas studi kaj restudi cxiu verkisto. Antaux kelkaj tagoj mi faris tion kaj ne povas esprimi al vi tiun salubran efikon, kiun havis por mi tiu legado".

Tial ne estas strange, ke Antoni Grabowski (1857 - 1921) en 1888 elektis La negxan blovadon por literature testi la eblojn de la lingvo de D-ro Esperanto. Por ni la traduko de Grabowski havas cxefe historian signifon, kiel teksto el la unua jaro de esperanto, kiam gxi aperis kiel naucentradika projekto. Evidente Grabowski mem bone konsciis pri tiu graveco, kiam li rezignis pri lingva revizio cxe la dua eldono, cxar "aliaj samideanoj eble interesigxos ekvidi, kiaj estis la infanaj kaj knabaj jaroj de la nuna virigxanta Esperanto".

La saman celon havas la nuna reeldono, aperanta kiel literatura suplemento al La Ondo de Esperanto. La teksto mem restis tute sen sxangxoj. Nur divido je alineoj kaj interpunkcio estas proksimigitaj al la originalo de Pusxkin. Tamen kelkaj lokoj en la pasint-jarcenta novelo bezonis notojn, kiujn legu cxi-sube.

NOTOJ

bostono. Speco de kartludo. jura alsidanto. Asesoro. sxajnkauzxo. Preteksto. glitveturilo. Sledo. versto. Ruslanda mezurunuo de vojlongeco, 1067 metroj. negxa blovado. Blizaro. fenestraj kovriloj. Sxutro. kuneligajxo. (Ruse:) Sako, farita el tuko aux alia sxtofpeco, kies kvar ekstremajxoj estas kunligitaj. glitveturila turnilo. Timono. standardestro. (Ruse:) La unua oficira rango en kavalerio kaj limgardistaro. Laux la Ruslanda rangtabelo "korneto" estis la 13a (plej malalta) arma rango tuj antaux subleuxtenanto (la 12a rango). La termino "korneto" fontas el la esperantigita rangtabelo en la verko de A. Rivier En Rusujo per Esperanto (Moskvo, 1911). geometriisto. Termezuristo. pikradetoj. Spronoj. kapitano de l' jxandarmaro. (Ruse: -) Distrikta polica prefekto, cxefo de polico en Ruslandaj distriktoj. profundaj kavoj. Ravinoj. temasxino. Samovaro. aminda ulano. A. Grabowski traktis la rusan vorton (malalta, malgranda) kiel (cxarma, aminda). Legu "malalta ulano". militistaro. Armeo.

Borodino. Vilagxo je 124 km okcidente de Moskvo, apud kiu 26 auxg. (7 sep. laux la Gregoria kalendaro) okazis la Borodina Batalo inter la ruslanda kaj napoleona armeoj. sensento. Sveno.

Frauxloj cxirkauxis tie cxi la amindan kaj ricxan frauxlinon. A. Grabowski cxi tie tradukas la rusajn vortojn jxeniHX (fiancxo) kaj neveta (fiancxino) per frauxlo kaj frauxlino. Legu "Fiancxoj cxirkauxadis... fiancxinon".

Artemizo. Vidvino de la galikarnasa regxo Mauxsolo, sxi ordonis konstrui monumenton Mauxzoleon (laux la nomo de la forpasinta edzo), kiu estis konsiderata kiel unu el la sep "mirakloj de l' mondo". La nomo Artemizo farigxis figura simbolo de la ideala edzino, kiu restas fidela al la edzo ecx post lia morto.

La muziko ludis muzikajn kantojn... Evidenta kompost-eraro: Legu "konkeritajn" aux "permilititajn" kantojn. (Ruse: zavojevannyje pesni).

Vive Henri Quatre (Vivu Henriko la Kvara, france). Strofoj el la komedio de franca poeto Ch. Collet (1709-1783) Henriko IV en cxasado (1779), kiuj popularigxis en Francio en la unuaj jaroj de la Restauro.

Jxokondo. Jxokondo aux sercxanto de aventuroj - komedia opero de franca komponisto I. Nicolo (1775-1818), gxuinta sukceson en Parizo en 1814.

Kaj en la aeron ili jxetadis la cxapelojn. Vortoj de Cxackij, protagonisto de Malfelicxo esti tro sprita (1825) de rusa dramaturgo, poeto kaj diplomato Aleksandr Gribojedov (1795-1829): per "Hura!" ili gloris nin, jxetante supren la cxapelojn. la du cxefurboj. Kvankam komence de la XVIIIa jarcento Peterburgo farigxis oficiala cxefurbo de Ruslando, oni kutimis dauxre apliki la epiteton "cxefurbo" al Moskvo.

...kun la Georgio en la buton-trueto. Kun la ordeno Kruco de Georgo.

Se amor non? che dunque? (Se ne amo, kio do

gxi estas? itale). Komenco de verso el la 132a
soneto de Petrarko (1304 - 1374) de la ciklo Dum
la vivo de Lauxra:

Se amor non? che dunque,? quel chi sento?

disligo. Solvo, rezulto.

...rememoris la unuan leteron de St. Preux...
St. Preux - protagonisto de la epistola romano de
J.-J. Rousseau (1712-1778) Julia aux nova Heloise
(1761). La vortoj de Burmin estas pruntitaj el
letero de St. Preux al Julia. posxta inspektoro.
(Ruse:) Staciisto - oficisto en la t. n. "posxta
stacio", loko kie haltis cxevalaj veturiloj en
grandaj (posxtaj) vojoj, kaj kie estis sxangxataj
cxevaloj. postiliono. Kocxero, kondukanta
publikajn (posxtajn) veturilojn en la "posxtaj
vojoj" inter la stacioj.

Aleksander Korjxenkov Se vi deziras publikigi
cxi tiun tekston, bonvolu skribi al la redakcio por
peti permeson (kiun ni versxajne donos).

Al la indekso

**This file was created
with BookDesigner program**

bookdesigner@the-ebook.org
04.08.2008